# KIEL DIRI TRIMANIERE

(13-A VIDEOLECIONO)

Celata publiko:

Lernintoj de baza kurso de Esperanto.

**Antaŭtaksita kvanto de la videoj: 14**

**Periodeco de la publikigoj: ĉiusabate.**


VIZITANTE
KELKAJN
INTERESAJN
LOKOJN
EN LISBONO



**La Triumfarko de la Strato Aŭgusta, en la Placo de la Palaco, ankaŭ konata kiel Placo de la Komerco.**




**Strato Aŭgusta**



Lifto
Sankta
Justa



La tramo
“Elektra 28”

La ĉarmo de la malnova parto de Lisbono estas ĝojige profunda kaj koraltira. En ĝi oni sentas la vivecon de bela tradicia urbo.



La nomata Malnova Lisbono estas profunde feliĉiga urboparto de la portugala ĉefurbo. En ĝi oni spiras ĉarmon, historion, amon kaj eĉ neidentigeblajn korsentojn.

Pasante tra la ĉarmaj kaj kortuŝe allogaj stratoj de la Malnova Lisbono, oni sentas dolĉan resopiron de io bele nekonita.

1. **Kial kelkaj turistoj, alveninte al Lisbono, havas la impreson, ke ili jam konis ĝin antaŭe?**
2. **Kial la lisbonaj stratirantoj estas tiel ĉarmaj kaj interagemaj?**
3. **Se vi jam vizitis Portugalion, kiam vi iris tien?**
4. **Kial ĉiuj, kiuj vizitas Portugalujon, forportas multan saŭdadon de ĝi en la koro?**
5. **Kiu loko en Lisbono restas en via memoro, aŭ kiun lokon vi ŝatus viziti tie?**
6. **Kion vi opinias pri la muziko faduo?**
7. **Kiu estas la plej fama fadukantistino en la portugala muziko?**




**Strato Sankta Johano de la Arbaro, en la kvartalo Madragoo.**

♫ Amália Rodrigues ♫

Kie situas la kvartalo Madragoo kaj historie kia ĝi estas?

Ĝi situas apud la enfluejo de la rivero Taĥo. Historie ĝi estas multetna kaj multkultura ejo en Lisbono.



Kie en Lisbono estas Madragoo kaj kia estas ĝia historia karakterizo?

La malnova kvartalo Madragoo estas borde de la rivero Taĥo. Ĝi karakterizas sin per multetneco kaj multkultureco.

En kiu loko situas la historia kvartalo Madragoo kaj kia tradicie ĝi estas?

Ĝi situas proksime de la enmariĝejo de Taĥo. Ĝi estas historie pluretna kaj plurkultura.



La kvartalo Madragoo

1. **Se vi ne estas lisbonano, nek vivas en Lisbono, kiu kvartalo en via urbo plej similas al Madragoo?**
2. **Kelkaj diras, ke la nomo Madragoo devenas el la esprimo "Madre de Goa", en aludo al antikva monaĥejo tie ekzistinta, dum aliaj diras, ke ĝi venas el "Mandragam", en aludo al la nomo de nobelulino el la portugala insulo Madejro. Kion vi opinias?**
3. **Ĉu estas vere, ke la granda portugala dramaturgo Gil Vicente naskiĝis en Madragoo?**
4. **Kial la kvartalo Madragoo estas historie konsiderata multetna kaj multkultura?**
   (Bonvolu respondi en la suba komentejo)



La Telfero

Kiujn aliajn nomojn havas la Telfero de Lisbono kaj kiom daŭras la promeno per ĝi?

Ĝiaj aliaj nomoj estas Telfero de la Parko de la Nacioj kaj Telfero de la Ekspo. La promeno per ĝi daŭras dum 8 minutoj.



Kiuj estas la aliaj nomoj de tiu telfero kaj kiom longe daŭras ĝia promeniga konduko?

Ĝiaj aliaj nomoj estas Telfero de la Parko de la Nacioj kaj Telfero de la Ekspo. La tempo de ĝia promenigo estas je 8 minutoj.

Kiel ankaŭ estas nomata la Telfero de Lisbono, kaj kiom da tempo daŭras la promenveturo per ĝi?

Ĝi estas ankaŭ nomata kiel Telfero de la Parko de la Nacioj kaj Telfero de la Ekspo. Ĝia promenigo daŭras 8 minutojn.

1. **Ĉu vi kredas, ke promeno per la Telfero ebligas panoraman vidadon de granda parto de la lisbonaj altiraĵoj, inkluzive de la Doko de la Olivarbejoj, de la Pavilono de Portugalio kaj de la Turo Vasko-da-Gamo?**
2. **Kial la Telfero de Lisbono (aŭ telekajuto) havas ankaŭ la nomon Telfero de la Ekspo?**
3. **Kiom da eŭroj oni devas pagi por trairi la 1.230 metrojn de la veturo per la Telfero?**
4. **Ĉu vi jam promenis per telfero? Se jes, kiam kaj kie?**
5. **Kiujn lokojn ligas la Telfero de Lisbono?**



**La Turo de Bet-Leĥemo**

Ĉu estas vere, ke la Turo de Bet-Leĥemo estas unu el la sep mirindaĵoj de Portugalio?

Jes, ĝi estas.



Oni diris, ke inter la sep portugalaj mirindaĵoj estas la Turo de Bet-Leĥemo. Ĉu tiu sciigo estas ĝusta?

Jes, kredu tion.

Mi aŭdis, ke la Turo de Bet-Leĥemo estas en la listo de la 7 mirindaĵoj de Portugalujo. Ĉu tio veras?

Jes. Estas vere.

1. **Kiujn aliajn monumentojn jam viditajn tie ĉi vi taksus kiel mirindaĵojn de Portugalio?**
2. **Inter la portugalaj literaturaj monumentoj, kiuj verkoj meritus la titolon de mirindaĵo de la intelekta mondo? Ĉu la piramidece eterna LA LUZIDOJ, de Luiz Vaz de Camões estus forta kandidato en via listo?**
3. **Por vi, ĉu la poemaro de la koloso Fernando Pessoa estas beletra havaĵo tipa de Portugalio, aŭ ĉu ĝi estas mirindaĵo de la tuta homaro?**
4. **En kiu jaro la lumtura verkisto José de Sousa Saramago ricevis la Nobel-premion pri Literaturo?**
5. **Kiu portugala verkisto skulptis la libron LA KRIMO DE PASTRO AMARO?**



**La rivero Taĥo**

Kion ligas tiu ponto super la rivero Taĥo?

Ĝi ligas Lisbonon al la urbo Almado.



Kion konektas tiu ponto super la rivero Taĥo?

Ĝi faras la konekton inter Lisbono kaj Almado.

De kio kaj trans kion oni pasas tra la ponto 25-a de Aprilo kaj al kie?

Oni pasas de Lisbono trans la riveron Taĥo, tra tiu ponto, al la urbo Almado.

1. **Kie naskiĝas Taĥo?**
2. **Kial la lisbonanoj tiel riverencas kaj ŝategas la mirindan riveron Taĥo?**
3. **Kiom longa estas Taĥo? Ĉu tiu iberia rivero havas pli ol aŭ malpli ol dek mil metrojn da longo?**
4. **En kiu jarcento eknavigis la portugaloj, per ŝipoj kaj karaveloj, celante la novan mondon?**
5. **Kiu estas la rivero plej proksima de tie, kie vi vivas? Ĉu estas ponto sur ĝi? Se jes, kiom da ili?**



**La Kastelo de Sankta Georgo**

**Kie situas la Kastelo de Sankta Georgo?**

**Ĝi situas en la paroĥo Sankta Maria Maĵora, de kie oni povas vidi preskaŭ la tutan Lisbonon.**



**En kiu loko troviĝas la Kastelo de Sankta Georgo?**

**Ĝi troviĝas en la paroko Sankta Maria Maĵora, de kie mireblas preskaŭ la tuta urbo Lisbono.**

**Kie estas la Kastelo de Sankta Georgo?**

**Ĝi estas en la paroĥo Sankta Maria Maĵora, de kie oni miras preskaŭ plene la urbon Lisbonon.**

1. **Ĉu vi sciis, ke la Kastelo de Sankta Georgo estas belega mirejo, de kie oni povas rigardi, interalie, grandan pecon de la rivero Taĥo?**
2. **Se vi jam vizitis tiun konstruaĵon, ĉu vi vizitis la nomatan "Obskuran Ĉambron" kun ĝiaj spegul-aranĝoj?**
3. **Ĉu vi scias, ke ekzistas en ĝi impona arkeologia loko, kun postrestaĵoj el ĝiaj antikvaj tempoj?**
4. **Kiom da mezepokaj kasteloj ankoraŭ ekzistas en Portugalio?**
5. **Se vi loĝas for de la iberia duoninsulo, ĉu estas multaj kasteloj en via lando? Kiun el ili vi jam vizitis?**



La Monaĥejo de la Hieronimoj

Kiu estas la alia nomo de la Monaĥejo de la Hieronimoj?

Ĝia alia nomo estas Monaĥejo de Sankta Maria el Bet-Leĥemo.



Kiel ankaŭ nomiĝas la Monaĥejo de la Hieronimoj?

Ĝi ankaŭ nomiĝas Monaĥejo de Sankta Maria el Bet-Leĥemo.

Kiel ankaŭ estas nomata la Monaĥejo de la Hieronimoj?

Ĝi estas nomata ankaŭ Monaĥejo de Sankta Maria el Bet-Leĥemo.

1. **Ĉu vi sciis, ke la Monaĥejo de la Hieronimoj estas konsiderata, de 1907, kiel Havaĵo de la Homaro, laŭ UNESKO?**
2. **Kion vi opinias pri ĝia fasono laŭ la manueleca arkitekturo?**
3. **Kial la reĝo Manuelo la 1-a petis permeson al la Sankta Seĝo, por konstrui tiun monaĥejon, en 1496?**
4. **Ĉu vi scias, ke la mortintaĵoj de Manuelo la Unua kaj liaj posteuloj restas en tiu konvento?**
5. **Kion volas diri al vi tio, ke tiu monumento havas, de 2016, la statuson de Nacia Panteono?**



La Oceanparko

Kion oni esploras en la publika kaj vizitebla oceanparko de Lisbono?

Maran Biologion kaj Oceanografion.



Pri kio oni studas aŭ esploras en la publika kaj vizitata Oceanparko de Lisbono.

Pri Biologio kaj Oceanografio.

Kio estas studata en la publika oceanparko de Lisbono, kaj kiu estas ĉies vizitebla?

Tie oni studadas Biologion kaj Oceanografion.

1. **Ĉu la oceanparko de Lisbono estas grandega akvario, aŭ ĉu ĝi estas io multe pli granda, elstara kaj impona ol tio?**
2. **Ĉar ĝi konsistas, tamen, el pli ol 30 akvarioj, ĉu eblas nomi ĝin ankaŭ kiel akvariaron?**
3. **Ĉu vi sciis, ke tia parko estis konstruita por partopreni en la Internacia Ekspozicio okazinta en Lisbono, en 1998?**
4. **Kiu estas la plej granda oceanparko de la mondo, tuj pli granda ol tiu de Lisbono?**
5. **Kiom da kvadrataj metroj estas en tiu publika fiŝejego?**

(Bonvolu respondi en la komentejo)

1. **Se vi partoprenos la 103-an Universalan Kongreson de Esperanto, kiujn urbojn vi volos viziti en Portugalio, krom Lisbono, post la kongreso? Ĉu Sintro, Porto, Brago, Koimbro, Setubalo, Santaremo, Ovaro, Pombalo, Almodovaro, Evoro...? Kiujn?**
2. **Kie situas la Rektorejo de la Universitato de Lisbono, kie okazos la 103-a Universala Kongreso de Esperanto? Ĉu vi konas ĝin?**
3. **Kiujn portugalajn intelektajn aŭtoritatulojn vi ŝatus koni en la UK de Lisbono?**
4. **Kiujn intelektajn esperantistojn vi esperas ronkonti dum la kongreso?**
5. **Fine, se vi jam vizitis Lisbonon, de kio vi plejkore sentas saŭdadon? Ĉu de la Malnova Lisbono, la tramoj, la rivero Taĥo, la oceanparko, la ĉarma luzitana popolo, la kasteloj, la Strato Aŭgusta, aŭ en via memoro insiste eĥas la sentoveka kanto de la faduo?**

# Organizis: Josenilton kaj Madragoa

